

Eŭropa Bulteno

Junio 2019, Numero 193

FINITA LA LERNEJA ELPROVADO DE MULTLINGVA AKCELILO



Erasmus+

Finiĝis la lernojaro kaj finiĝis ankaŭ E-kursoj en tri bazaj lernejoj (Zagreb –Kroatio, Ŝentilj – Slovenio kaj Vraca – Bulgario. La kursoj daŭris dum 64 lernohoroj laŭ la lernprogramo kaj didaktikaĵoj kiujn paralele kreis la teamo de la projekto Multlingva Akcelilo. Komencis lerni po 14 infanoj 8-9-jaraj en ĉiu lernejo kaj finis ĉion entute 30 infanoj (ĉar intertempe oni ŝanĝis la klasojn kaj kelkaj infanoj foriris en aliajn klasojn). Fine de la projekto mi mem okazigis ekzamenojn pri la rezultoj por la grupoj en Ŝentilj kaj Zagreb. Entute 20 infanoj partoprenis en la ekzamenoj kaj nur unu malsukcesis fari tion, kio estis la celo: kapabli kunmeti eseeton el minimume 10 frazoj pri al si konataj temoj kaj ĉiu devis kapabli dum tri minutoj eldiri minimume 7 frazojn pri simplaj temoj. La kvanto de gelernantoj estas tro malgranda por povi ion el tio konkludi, krom ke la motivo por lernado ĉe ĉiuj estis granda kaj ke la aktivecon kun ĝojo efektivigis kaj la infanoj kaj la geinstruistoj kaj la gepatroj. Fine de la lernojaro, je la iniciato de la geinstruistoj mem okazis du unutagaj renkontiĝoj de la grupoj el Zagrebo kaj Ŝentilj: Unue en Zagrebo kaj poste en Ŝentilj kie la infanoj pli bone interkonatiĝis reciproke kaj vidis la lernaĵan laboron kaj organizon en la du ŝtatoj.

Kiel mi jam skribis en antaŭaj artikoloj, la tuta praktiko elprovi la novan instrudidaktikon en minimume tri lernejoj montris interalie kelkajn neantaŭvideblajn rezultojn: ke ĉiuj tre ŝatis la lernadon kaj ke la gepatroj kaj la geinfanoj demandas ĉu kaj kiel ili povos daŭrigi la lernadon kaj ke ili mem je la propraj kostoj komencis krei amikecojn per reciprokaj vizitoj.

Kio koncernas la didaktikon, ĉiuj antaŭviditaj antaŭsupozoj estis konfirmitaj: Ke la kurson kun adekvataj instrukcioj povas sukcese gvidi fremdlingvaj geinstruistoj kiuj ne antaŭe lernis E-on, ke la metodo devas baziĝi je minimuma leksiko baze de la plej oftaj morfemoj uzataj en praktika esperanto-vivo kaj apliko de komputilaj metodoj samkiel uzado de maksimume da dialogado kaj parolekzercoj. Fine de la du kursoj mi faris ankaŭ enketon pri tio, kiuj el la dek diversaj metodunuoj estis al infanoj plaĉaj kaj kiuj ne. Ĉiuj ege ŝatis komputilajn ekzercojn, ekzercojn kreadi frazojn el prezentitaj diverskoloraj vortoj kaj ludado en dialogoj, skeĉoj kaj kantadon de E-kantetoj preparitaj por ilia scinivelo. Iom malpli ili ŝatis legadon de E-tekstoj, ankoraŭ malpli la ambaŭdirektajn tradukojn kaj la plej malŝatata estis la klasika parkerado de vortoj.

Post interparolo kun geinstruistoj montriĝis ke la tuta materialo por instrui estis tro ampleksa kaj ne eblis ĉion realigi kaj tio devigas nin en la projekto ankoraŭ malpligrandigi la materialon. Tion ni faros en la lasta fazo de la projekto (ĝis la jarfino 2019). Post tiu lasta interveno en la didaktika materialo la teknika stabo (kreantoj de komputilaj ludoj kaj ekzercoj – Universitato en Odense kaj kreantoj de la projekta paĝaro – Studio Gaŭs - faros sian laboron. Tute ĉe la fino ankoraŭ oni tradukos la tuton al 6 lingvoj de la partneroj kaj Esperanto plus la angla tiel ke ekzistos publika aliro al instrukciaro kaj metodika materialo por ĉiu interesito en la koncernaj 8 lingvoj.

Dum la Eŭropa Konferenco kie oni traktos la instruadon de fremdlingvoj en EU, okazonta fine de aŭgusto en Triesto – Italio, oni aparte sin dediĉos al la rezultoj de Multlingva Akcelilo kaj kiujn perspektivojn tio donas al E-Movado en EU sed ankaŭ pli vaste.

Zlatko Tišljarić

AGADO DE LA PREZIDANTO DE EEU KADRE DE UN-JARO DE INDIĜENAJ LINGVOJ 2019:

- 11 aprilo 2019: Prelego pri "Tri Homoj, tri Lingvoj - Zamenhof, Ben Yehuda kaj Douglas Hyde" dum la 20a Israela Kongreso de Esperanto, Eilat, Israelo.
- 14 aprilo 2019: Prelego pri EEU-agado dum MONA-kunveno, Akaba, Jordanio.
- 2 majo: Salutmesaĝo al la Hispana Kongreso de Esperanto, Malago, Hispanio
- 3 majo: Prelego pri "La Irlanda kaj la Kimra Lingvoj" dum la Hispana Kongreso de Esperanto, Malago, Hispanio.
- 6 majo: Prelego germanlingva pri la irlanda lingvo al 200 slovakaj instruistoj de la germana, Bratislavo, Slovakio.
- 11 majo: Prelego pri la irlanda lingvo al la Tutslovaka Kongreso de Esperanto, Liptovský Hrádok, Slovakio.
- 30 majo: Prelego pri "La irlanda kaj hebrea lingvaj revivigoj" dum la Poliglota Kunveno, Bratislavo, Slovakio.
- Kurso de la irlanda lingvo por komencantoj dum la Poliglota Kunveno, Bratislavo, Slovakio.
- 2 junio: Prelegeto pri lingvolernado kaj Esperanto dum la solena fermo de la Poliglota Kunveno (cheestis 654 poliglotoj el 67 landoj), Bratislavo, Slovakio.
- 8 junio: Prelego pri la irlanda lingvo dum la solena malfermo de la Germana Kongreso de Esperanto, Neumünster, Germanio.

Seán Ó Riain

EN UNESKO-JARO DE INDIĜENAJ LINGVOJ: 96-A GERMANA ESPERANTO-KONGRESO EN NEUMÜNSTER



Ĉirkaŭ 130 partoprenantoj el deko da landoj ĉeestis la 96-an Germanan Esperanto-Kongreson en Neumünster (norda Germanio). Kiel temon la organizantoj estis elektintaj la UNESKO-jaron de indiĝenaj lingvoj 2019. UNESKO konsentis registri la kongreson kiel oficialan kontribuon al la tema jaro. Kaj evidente pri tiu temo esperantistoj povas multon diri. Dum la malferma sesio de la kongreso, en kiu ankaŭ ĉeestis neesperantistaj fakuloj, parolis prof-o Eduard Werner (universitato de Leipzig) pri la situacio de la sorabaj lingvoj en la oriento de Germanio, d-ro Seán Ó Riain pri la irlanda lingvo kaj Nicole Margot pri la aktivecoj de la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL). La okcitana kaj la provencefranka (arpitana) lingvoj estis pliaj temoj, pri kiuj dum la kongreso parolis Jean-Marc Leclercq (JoMo) kaj Nicole Margot. La vesperoj estis dediĉitaj al loka (knabina muzikgrupo el Neumünster) kaj esperantista (JoMo) muzikaj kulturoj: ĉi-lasta koncerto ankaŭ altiris vizitantojn el la urbo, inter ili ĵurnalistinon, kiu poste raportis.

Montriĝis ke la temo kaj la ligo al la UNESKO-jaro helpis vekti publikan atenton: multaj germanaj amasmedioj transprenis artikolon de novaĵagentejo pri la kongreso. Salutmesaĝojn sendis pluraj institutoj kaj organizoj de aŭtoktonaj lingvaj minoritatoj en Germanio. La ministroprezidanto de la federacia lando Schleswig-Holstein en sia mesaĝo memorigis pri la minoritatoj aktivaj en tiu lando, inter ili frisoj kaj danoj. Kunlabore kun la loka civitana asocio „die NähMaSchine“ („kudromaŝino“: Neumünster iam estis centro de teksaĵindustrio) Germana Esperanto-Asocio (GEA) organizis aŭtoran horon kun Thorsten Sueße el Hannover, psikiatro, esperantisto kaj aŭtoro de krimromanoj, en la loka muzeo pri teksaĵoj kaj tekniko. Sen grandaj ŝanĝoj restis la estraro de GEA reelektita dum la jarĉefkunveno en la kadro de la kongreso. Sian venontan kongreson GEA planas okazigi kune kun la Pola Esperanto-Asocio kaj la Internacia Fervojista Esperanto-Asocio dum la pentekostaj tagoj 2020 en Frankfurt kaj Slubice ambaŭflanke de la pola-germana limo.

Ulrich Brandenburg

BENELUKSA KONGRESO 2019

La Beneluxa Kongreso okazos ĉi-jare en Charleroi. Aliĝi eblas ĉi tie:

[Aliĝilo – formulaire d'inscription – inschrijvingsformulier](#)

Post via aliĝo, eventuale indiku en la [Facebook-okazaĵo](#) ke vi venos. Invitu viajn amikojn!

Praktikaĵoj:

- Datoj: 19-22 septembro 2019
- Loko: [Junulargastejo de Charleroi](#), je promena distanco de la stacidomo
- Ĉefaj organizantoj: Association pour l'Espéranto (APE)
- Valère Doumont: ĝenerala kunordigo kaj financoj +32 485 517 552
info@verdajskoltoj.net
- Yves Nevelsteen: programo kaj retejo +32 472 106 086, yves.nevelsteen@gmail.com

Provizora programo:

- Ĵaŭde ni kune vizitos Le Bois du Cazier. Tiu ekskurso jam estas inkluzivita en la kotizo.
- Kursoj: kurso por progresantoj (Kristin Tytgat), paroligaj rondoj (Yves Nevelsteen), perfektiga kurso (Lode Van de Velde)
- Ludvespero: prezento de ludo kiun Lode mem kreis + estos pluraj Skrablo-tabuloj kaj aliaj tabloludoj
- Prelegoj kaj prezentoj
 - Eventa Servo, nova retejo por diskonigi Esperantajn okazaĵojn + www.benelukso.eu
 - Esperantaj markonomoj en Benelukso
 - Projekto Dua Lingvo (ne Duolingo)
 - Korpa humiĝado (Monique Van Roy)
 - Carol'Or (Jean-Pol Sparenberg)
- Promenado por malkovri la eksindustrian urbon Charleroi
- Ekskursoj (krompagendaj)
- Libroservoj de FEL kaj Eldonejo Libera
- Prezento de novaj libroj:
 - Eldonejo Libera: nova Esperantokurso por nederlandlingvanoj, nova versio de Karlo de Edmond Privat
 - FEL: Esprimaro, nova verko de Petro Desmet'
- Montrado de filmoj kaj/aŭ prelegoj (ekzemple pri Briteliro) + diskutrondoj

Claude Glady

NOVSPECAJ KURSOJ DE DENIS KEEFE

Jen priskriboj de novaj kursoj prezentotaj de mi por spertaj Esperantistoj, amikoj de UNESKO, kursgvidantoj kaj aktivuloj en la Esperanto-Movado -- antaŭ kaj post la Universala Kongreso -- en la bela, alloga, unika Kastelo de Grésillon en Francio. Mi esperas, ke vi ŝatos ĝuste tiajn kurso-enhavojn, kiujn mi plene priskribas en pluraj artikoloj en la revuo Esperanto, kaj en la fakĵurnalo IPR, Internacia Pedagogia Revuo de ILEI. Ĉi tiuj kursoj estos prezentitaj ne nur por lerni la enhavon de la materialo, sed ankaŭ por lerni kiel uzi ilin poste en VIAJ lokaj kluboj, lokaj asocioj de Esperanto. Tio estas, vi lernos kiel lernanto, kaj vi lernis ankaŭ kiel iĝi kursgvidanto, se vi volas, de tia materialo. Jen sube iom da informo pri la antaŭ- kaj postkongresaj kursoj en la Kastelo de Grésillon.

1 UNESKO-Kuriero, Pensiga Kurso.

Legi, Kompreni, Prezenti, Interdiskuti.

Unu el la ĉefaj atingoj de la Esperanto-Movadoj en la lasta jardeko estas la eldonado de revuo de UNESKO en Esperanto. Sed kiel ni povas utiligi nun UNESKO-Kurieron en la klasĉambro, en niaj lokaj grupoj, por plenkreskuloj? En Somero antaŭ la Universala Kongreso en Finnlando, inter la 6a kaj la 18a de julio, en la bela Kastelo de Grésillon, ni esploros ĝuste tiun temon, kun la espero, ke vi mem povos poste starigi tian kurson en via loka klubo, aŭ utiligi la enhavon de UNESKO-Kuriero, esperante kaj nacilingve, por antaŭenigi la celojn de Esperanto kaj de UNESKO en via urbo, en via lando. Artikoloj en la revuo de Esperanto (Februaro, 2018), kaj la ĉefartikolo de la Internacia Pedagogia Revuo de ILEI (2019-1) parolas pri le kurso gvidata de Dennis Keefe kaj en Azio kaj en Eŭropo. Iru al la retejo de la Kastelo: gresillon.org/s2

2 Charlie Chaplin, Pensiga Kurso

Mi vid(ig)is, Mi rid(ig)is, Mi pens(ig)is, Mi lern(ig)is.

Inter la jaroj 1915 kaj 1936, la fama filmisto Charlie Chaplin, Ĉoĉo, kreis dekojn da altkvalitaj filmoj, kiuj estas surprize kaj mirinde efikaj por paroligi gelernantojn en niaj kursoj por komencantoj, komencintoj kaj eĉ por spertaj Esperantistoj. Estas iom paradokse, ke senparolaj filmoj kreas tiom da emoj paroli (multe pli ol teskto kaj bildoj) en esperantaj kursoj, Kial? Parte ĉar la ideoj sen vortoj devas klare prezentiĝi surekrane, kaj parte ĉar Chaplin estas geniulo pri homa esprimado kiu mense kaj kore tuŝas nin. Faka artikolo pri ĉi tia kurso troviĝas en IPR, Internacia Pedagogia Revuo (2017-4). La kurso disvolviĝos en aŭgusto, inter la 6a kaj la 18a, post la Universala Kongreso en Finnlando. La plej rigida, sed serioza, kurso de Dennis Keefe. Iru al la retejo de la Kastelo: gresillon.org/s4

Denis Keefe

SES kaj SEP – DU EBLOJ PASIGI UTILE KAJ AMUZE SOMERAN SEMAJNON



Jam tre baldaŭ – inter 12a kaj 20a de julio 2019 okazos samloke en Nitra, Slovakio du partoprenindaj eventoj: la jam tre konata kaj eblas diri tradicia SES (Somera Esperanto-Studado) kaj tute nova kaj samtempe noviga aranĝo SEP (Somera Esperanto-Programado). Prezenti SES verŝajne al la legantoj eĉ ne bezonatas –

pri la evento oni jam bunte informas ĉiujare. Se hazarde iu ne konus la tutmonde plej grandan someran Esperanto-lernejon, tiu nepre vizitu la ĉefpaĝon: <https://ses.ikso.net>, por konatiĝi kun la detaloj (eventuale rekte aliĝi). Ĉi-foje ni prefere prezentos la novigan kaj unikan aranĝon, kiu entute la unuan fojon okazos en Esperantujo – SEP! La unuan fojon en la historio de Esperantujo ni invitas vin al SEP, la unua Esperanta hackthon!

Kio estas *hackathon* (Esperante kodummaratono)?

“Hackathon”, kiun oni ankaŭ foje nomas kodumtago, kodumfesto aŭ kodfesto, estas fasona sprinteevento, dum kiu programistoj kaj aliaj fakuloj de program-kreado, inkluzive de grafikistoj, interfacfasonistoj, projektmanaĝeroj kaj aliaj, intense kunlaboras pri komputilaj projektoj. La celo de kodummaratono estas krei funkciantan programaron aŭ aparataron fine de la evento. Kodummaratonoj kutimas havi specifan temon, kiu povas esti programlingvo, aplikaĵo, API. Foje limigoj entute ne estas. Fine de la evento oni prezentas sian projekton.

SEP (Somera Esperanto-Programado)

La unua ideo pri SEP venis de Georg Jähnig el Berlino, kiu proponis la ideon de kodummaratona okazaĵo dum SES ĉi-jare de la 12-a ĝis 20-a de julio 2019 en Nitra (Slovakio). Ĉar programistoj ne mankas en Esperantujo, ŝajnis strange al ni, ke ĝis nun ankoraŭ neniu tia evento okazis, kaj pro tio ni decidis organizi SEP-on. Dum 7 tagoj, ni programos, grafikumos kaj fasonos ĉiumatene. Oni povas veni kaj krei propran projekton, teamiĝi kaj eĉ estos projektoj proponitaj de ni, kiuj estas elpensitaj tiel, ke ili helpu Esperantujon.

- 7 tagoj
- Unu temo
- Programistoj, grafikistoj kaj profesiuloj de la tuta mondo
- Matena programado
- Venu kun propra projekto aŭ laboru pri iu proponita

Organizantoj de SEP: E@I

Partneroj de SEP: UEA kaj ESF

Do jen, ĉu lerni Esperanton dum SES aŭ veni programi/grafukumi por Esperantujo – ambaŭ aferoj samloke fareblas en Slovakio ĉi-somere!

Peter Baláž

POLYGLOT - GATHERING 2019 – LA PLEJ GRANDA

La aranĝo „Polyglot Gathering“ (Plurlingvula kunveno) allogis al Bratislavo, Slovakio fine de majo rekordan kvanton de plurlingvemuloj. Entute 654 homoj el 67 landoj partoprenis la aranĝon.



Jam la 6-an fojon okazis la evento, kaj kio estas ĝojiga pri ĝi – ĉiujare ĝi allogas pli kaj pli da homoj (ĉi-jare ja venis je 116 homoj pli ol la pasintan jaron)! Poliglotoj (plurlingvemuloj) ja evidente ekas malkovri sin kiel komunumo, intereso-grupo, movado. Eĉ sen firmaj movadaj kaj organizaj strukturoj, sentblas la emo renkontiĝadi kaj fari ion „utilan“ kaj interesan por si mem kaj por aliaj poliglotoj. Tiel ja naskiĝis ankaŭ la aranĝo „Poliglota kunveno“ - kiun efektive ja fondis tri esperantistoj kaj nun plu aliaj esperantistoj (ene de E@I) organizas ĝin. Oni ne ŝokiĝu (estante ĝisosta esperantisto): la ĉefa komuniklingvo de la aranĝo estas la angla! Sed... ĝi ja estas tie pro praktikaj kialoj – plej multaj poliglotoj nuntempe ja regas ĝin. Do por doni la gravajn anoncojn, aranĝi pagojn, sciigi pri manĝoj, programo, ekskursoj ktp. - tie oni uzas la anglan. Sed krome – ĉiuj tiuj poliglotoj ja venas al la aranĝo ĝuste por praktiki aliajn lingvojn! Ofte ili venas, ĉar en tia ĉi aranĝo ili trovas rarajn eblojn: a) renkonti „plurlingvemajn samideanojn“ - do homojn, kiuj samkiel ili ŝatas lerni diversajn (jes ja, eĉ tre ekzotikajn) lingvojn; b) aŭskulti prelegojn pri lingvo-rilataj temoj (ofte de tre famaj kaj prestiĝaj poliglotoj, profesoroj ktp.); c) praktiki siajn diversajn lingvojn; ĉ) pasigi tempon kune, renkonti malnovajn amikojn kaj/aŭ trovi novajn amikojn, aŭ eĉ laborpartnerojn.

Jen do, estas multaj kialoj por veni al „Polyglot Gathering“! Kio ĝojigas estas la fakto, ke kutime ĉ. 20-25% da homoj parolas (ankaŭ) Esperanton! Do oni povas tie pasigi sian tempon tute trankvile ankaŭ uzante nian verdan lingvon :). Ĉi-jare ankaŭ okazis pluraj prelegoj aŭ pri aŭ en Esperanto, oni povis viziti Aligatorejon, Gufujon, kulinaran festivalon ktp. Eĉ la plej juna preleganto estis Esperantisto: nur 14-jaraĝa E-isto el Rusio: Petro Fedosov. Same (jam la 6an fojon) okazis t.n. Lingva defio (Language challenge) – ĉi-jare ĝi okazis pri du malsamaj lingvoj: hindi kaj Esperanto. (Oni devas eki lerni la lingvon 60 tagojn antaŭ la aranĝo kaj dum la evento oni faras teston, kie oni pritaksas la nivelon de la lernintoj).

Origino

Efektive, la evento „Polyglot Gathering“ havas por ni esperantistoj ege interesan historion – eĉ se ankoraŭ mallongan. Kun la ideo venis esperantistoj Chuck Smith kaj Judith Meyer en Berlino en la jaro 2014 – ĉar simila evento (Polyglot Conference) devis tiujare okazi en Usono, oni ne volis atendi ĝis la jaro 2015 (kiam ĝi eble revenus al Eŭropo) kaj decidis okazigi propran poliglotan eventon (kaj titolis ĝin „Polyglot Gathering“) en Berlino. Tiel la unuajn tri jarojn ĝi okazis tie. Kaj kio kaŭzis, ke ĝuste tiu ĉi evento iĝis tiom alloga kaj ŝatata de la komunumo de plurlingvuloj? Eble tio estas granda merito de la tuta koncepto, kiun

Chuck kun Judith prenis rekte de la Esperanto-eventoj kaj agordis ĝin por la plurlingvula grupo. Ili sukcese transprenis plurajn sukcesajn aferojn de Esperanto-aranĝoj kaj enprogramigis ilin al tiu ĉi evento. Kaj evidentiĝis, ke tio estis ĝusta decido! Tiel do oni povas dum Polyglot Gathering trovi „Gufujo“-n, Aligatorejon, Interkonan vesperon, Kulinaran festivalon, plurlingvan koncerton de jOmO (aŭ alia/j esperantisto/j) ktp. Jen do, pruvo, ke nia EO-mondeto povas esti alloga ankaŭ por la cetera mondo! :) Kaj ekde 2017 la aranĝon ĉeforganizas E@I, kiu uzas en sia oficejo Esperanton kiel laborlingvon. Plua videbleco (kaj aŭdebleco) de Esperanto dum la aranĝo do estas garantiita :). Krome ni devas alte taksi la rolon de la Esperanto-organizoj, pretaj subteni la aranĝon. Ĉi-jare (samkiel pasintjare) UEA mem estas subtenanto (sponsoro) de la aranĝo kaj tiel grave helpas videbligi Esperanton en la evento.

Kaj kio pri la estonto? La aranĝo ja havas evidente kreskantan potencialon – kaj ni kiel organizantoj emus utiligi tion. Venontjare la aranĝo okazos 26.-30.5.2020 en Pollando – proksime de Varsovio (Teresin). Ĉi-foje la tuta evento okazos sub unu tegmento – laŭ la stilo de ordinara EO-aranĝoj oni kaj kongresumos kaj tranoktos en la sama konstruaĵo (tio tamen validos nur por unuaj 300 aliĝintoj, por la sekvaj ĉ. 400 estas aranĝitaj plurnivelaj hoteloj en la apudeco – eĉ pieddistanca). La aranĝo eble komencos „vagadi“ tra la mondo (aŭ almenaŭ Eŭropo) kaj efektive jam baldaŭ povas iĝi iaspeca „Universala Kongreso de Poliglotoj“ :). La potencialo estas, emo organizi ĝin same – do espereble ĝis revido kun vi, kara (plurlingvema) leganto, dum iu el la sekvaj Plurlingvemulaj kunvenoj!

Pli da informoj (angle): www.polyglotbratislava.com

Peter Baláž, E@I-kunordiganto

La artikolo aperis en Ondo de Esperanto

TUTSLOVAKIA ESPERANTO-KONGRESO 2019



TEK 2019 aŭ plennome Tutslovakia Esperanto-Kongreso okazis inter 9.5. – 12.5.2019, en la urbeto Liptovský Hrádok (“Liptova Kasteleto”) – samurbe, kie ĉi-julie okazos historie la unua IJK en Slovakio! La ĉeftemo de la kongreso estis “Esperanto – subtenanto de multlingvismo kaj lingvo-protektanto”.

Pri tiu ĉi temo havis sabate la ĉefprelegon rekte la prezidanto de EEU: Seán Ó Riain. La aranĝon kunorganizis SKEJ (Slovakia Esperanta Junularo) kunlabore kun SKEF (Slovakia Esperanta Federacio).

TEK okazas ĉiun trian jaron (kiam temas pri la balota jaro, intertempe okazadas ne kongreso sed renkontiĝo (TER). Krom la „kutima“ programo de prelegoj, diskutoj kaj ekskursoj ne mankis do ĉi-foje ankaŭ la jarraportoj de unuopaj EO-kluboj kaj organizoj en Slovakio kaj sekve balotoj por la nova estraro de SKEF. TEK ĉi-jare estis dediĉita interalie al diversaj kontribuoj de Esperanto, nemateriala kultura heredaĵo, kaj memkompreneble al la unua slovakia IJK kaj ĝiaj eblaj kontribuoj al liptova regiono. Tial do eblis ekkoni la planojn de agado de SKEF kaj SKEJ, partopreni en diskutoj, proponi novajn agadojn, mem kontribui kaj ankaŭ partopreni la ceteron de la amuza programo!

Pri la urbo

La urbo Liptovský Hrádok estas urbeto, kiu troviĝas inter du famaj montaroj en norda Slovakio – inter Altaj kaj Malaltaj Tatroj – kaj ĉe la krucvojo de du riveroj – Váh kaj Belá. En la urbo loĝas pli-malpli 7000 loĝantoj, do ni havas ŝancon videbligi Esperanton en tiel malgranda urbo. La urbeto mem ekzistas jam pli ol 700 jarojn kaj estas ĉirkaŭita de ĉefe unikaj, diversaj kaj turisme allogaj atrakcioj kaj vidindaĵoj. Inter ili estas troveblaj:

- naciaj kulturaj monumentoj – mezepoka kastelo, preĝejoj, sonorilejo, konstruaĵo de antaŭa Sala kaj kupra oficejo;
- restaĵoj de juda tombejo kaj unikaj konstruaĵoj, kiuj estis konstruitaj pere de specifa teĥniko de Liptovaj muristoj;
- la plej alte funkcia arboreto en meza Eŭropo; tilia aleo, en kiu estas arboj pli ol 200 jaraĝaj.

Programo

Dum la evento okazis prelegoj, diskutoj, raportoj pri agado, kunsidoj de laborgrupoj kaj lokaj organizoj, sed ankaŭ konkurso, kvizo, medogustumado, projekciado de filmo, kaj vizito de la urbo kun urba ludo. Ne mankis ekzemple eĉ libervole elektebla „flosigado“ tra la apuda rivereto sur la gumaj flosoj. Elinter la prelega parto de la evento jam vendrede estis ja pluraj tre interesaj: ekz. tiu de la hungara s-ano Imre Keményfi: „Samaj, similaj kaj konfuzaj vortoj inter la slovakaj kaj hungaraj lingvoj“, de la ĉeĥa aktivulo Petr Chrdle: „Pri la japana bohemisto Kurisu Kei“ aŭ du prezentoj de la loka liptova E-isto-vojaĝanto Ján Vajs: „Esperanto-sumoo“ kaj „Liptovaj Esperanto-gravuloj“. Prelego de Jozef Reinvarť ankaŭ traktis la ĉeftemon de la aranĝo: „Vademecum de multdisciplina projekto “Movebleco kaj inkluziveco en multlingva Eŭropo (MIME)”. Vespere okazis prezento de la freŝaj eldonaĵoj de la eldonejoj Espero (de Slovakio) kaj KAVA-PECH (de Ĉeĥio).

Sabate la programo komenciĝis pere de la prezento de Lokaj eo-kluboj kaj organizoj. Sekvis prezento de la SKEF-prezidanto Peter Baláž pri provo enskribi nian lingvon al nacia Unesko-komisiono sub la titolo: „Esperanto kiel nemateria kultura heredaĵo de Slovakio“. La proceduro sukcese estis sendita al la decida instanco, nun necesos atendi ĝis la jarfino por la rezulto.

Dum la tuta evento funkciis riĉa libroservo (de la eldonejo Espero) kaj okazis konkurso pri la nova ludo de EĉeI „Vortoj“ (pli pri ĝi en www.vortoj.net/eo)

Elektoj

Sekva programero sabate estis la balotoj por SKEF – por la posteno de prezidanto ne estis aliaj kandidatoj ol la ĝisnuna: Peter Baláž. Sekve la nove elektita estraro aspektas jene:

Peter Baláž - prezidanto

Jozef Reinvarť – vicprezidanto

Mária Pilková - kasisto

Eva Poláková - monpetoj/scienco

Pavol Petrík - ES-redaktoro

Magdaléna Fejfičová - revizoro

La reelektita prezidanto skize prezentis sian imagon pri la farendaĵoj kaj ankaŭ pri la plibonigindaĵoj. Elinter la planoj estas tiuj por la rekonstruo de la retejo www.esperanto.sk, kreo de novaj, rete uzablaj informiloj, ordigo de la administrado de la organizo kaj membroj, tutjara kurso de EO por la porinfana monata gazeto Maxík kaj solvo de la situacio ĉirkaŭ la slovakia EO-arkivo kaj biblioteko. SKEF ankaŭ volas kontribui al la aranĝoj, planataj en proksima tempo en Slovakio: elinter ili LingvaFest', SES, TER, KAEST 2020, Zamenhof-festoj...

Entute 35 homoj el 6 landoj partoprenis la aranĝon – certe ne multe – sed konsiderante la (mal)grandecon de la lando, la kvanto estas ja komparebla kun tiu de grandaj landoj kun eĉ multe pli forta movado. (Des pli, se oni aldone imagas, ke okazas tiom da diversaj EO-eventoj en Slovakio – eĉ signife pli grandaj kaj internaciaj – kiel ekz. SES, KAEST, (IJK ĉi-jare) ktp. Sume do temis pri tre utila, inspira kaj ĉarma aranĝo – ni esperu ke ĝi jam baldaŭ portos siajn fruktojn!

Peter Baláž, SKEF-prezidanto

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 30-an de junio 2019

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljár, Seán Ó Riain, Ulrich Brandenburg, Claude Glady, Denis Keefe, Peter Baláž

Kontakto: [ztisljar \(ĉe\) gmail.com](mailto:ztisljar@europa.eu)

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

